

Unuigita fronto kontraŭ la ŝuldo

La 29-an de julio 1987-a en Adis-Abebo, Thomas Sankara partoprenis en la dudek-kvina Estrar-konferenco de la ŝtataj membroj de la Organizaĵo por Afrika Unueco (OAU aŭ OUA laŭ la franca nomo, anstataŭigita per la Afrika Unio la 8-an de junio 2002-a). Tie li eldiris la jenan diskurson, poste transskribitan el registraĵo. La kunsido-prezidanto estis Kenneth Kaunda el Zambio. Tiu ĉi teksto estis elprenita el la numero de februaro 1989-a de "Coumbite", trimestra revuo publikigita en Parizo.

Sinjoro Prezidanto,
Sinjoroj Estroj de la delegacioj,

Mi dezirus, ke ĝuste en tiu momento ni estu kapablaj paroli pri tiu ĉi alia temo, kiu ĉagrene absorbas nin : la temo pri la monŝuldo, la temo pri la ekonomia situacio de Afriko. Ĝi estas tiom grava kondiĉo, kiom la paco cele al nia postvivo. Kaj tial mi opiniis, ke necesos altrudi al vi kelkajn minutojn, por ke ni preparolu ĉion ĉi.

Burkino unue dezirus esprimi sian timon. La kunvenoj de la OAU sinsekvas, similas, sed ni timas, ke la intereso por tio, kion ni faras, malgrandiĝos.

Sinjoro Prezidanto,
Kiom da regnestroj ĉeestas, kvankam ili estis regule vokitaj al Afriko por diskuti pri Afriko ?

Sinjoro Prezidanto,
Kiom da regnestroj estas pretaj aviadile flugi al Parizo, al Londono, al Vaŝingtono, kiam tien for oni alvokas ilin por kunsido, sed ne povas veni tien ĉi por kunsidi en Adis Abebo en Afriko ? Tio ĉi tre gravas. (*aplaŭdoj*). Mi rekonas, ke iuj havas validajn kialojn por ne veni. Tial, mi dezirus proponi, Sinjoro Prezidanto, ke ni starigu baremon de sankcioj celantaj la regnestrojn kiuj ne ĉeestas. Ni agu tiamaniere, ke dank' al poentaro de bona konduto, la regulaj venantoj kiel ni ekzemple (*ridoj*) estu subtenataj pro iuj el siaj streboj. Jen ekzemploj : la projektoj, kiujn ni submetas al la Afrika Banko por Disvolviĝo (BAD laŭ la franca akronimo por "Banque Africaine de Développement"), nepre estu almetitaj de iu koeficiento de "afrikaneco". (*aplaŭdoj*) La malpli afrikanaj tiel estos admonitaj, kaj sekve ĉiuj venos por kunsidi.

Mi dezirus diri al vi, Sinjoro Prezidanto, ke la temo de la ŝuldo estas por ni temo, kiun ni ne povos prisilenti. Vi mem multe scias pri tio en via lando, kie vi nepre alprenis decidojn kuraĝajn eĉ aŭdacajn. Decidojn ne rilatantaj al via aĝo laŭ viaj blankaj haroj. (*ridoj*) La Ekscelenca Prezidanto Habib Bourgiba, kiu ne povis veni, sed kiu transsendis al ni signifoplenan mesaĝon, donis tiun alian ekzemplon al Afriko, kiam en Tunizio pro ekonomiaj, socialaj kaj politikaj kialoj, ankaŭ li nepre devis preni kuraĝajn decidojn.

Sed Sinjoro Prezidanto, ĉu ni plu lasos la regnestrojn, ke ili unuope serĉas solvojn al la problemoj pri la ŝuldo kun la risko krei sociajn konfliktojn, kiuj povus endanĝerigi ilian propran stabilecon eĉ la konstruadon de la Afrika unueco ? Ĉar da tiaj ekzemploj, pri kiuj mi parolis, ekzistas multaj aliaj, estus preferinde, ke la estrar-konferenco provizos nin ĉiujn per trankviligaj respondoj koncerne la temon de la ŝuldo.

Ni opinias, ke la ŝuldo estas analizebla per sia deveno. La deirpunkto de tiu ĉi ŝuldo koincidas kun la originoj de la koloniismo. Pruntis al ni monon, ja tiuj, kiuj koloniis nin. Ankaŭ ili mem administris niajn ŝtatojn kaj ekonomiojn. La koloniintoj faris Afrikon ŝuldanta al la pruntedonintoj, kiuj estas

ankaŭ iliaj fratoj kaj kuzoj. Ni ne sentas nin koncernataj de tiu ĉi ŝuldo. Ni konsekvence ne estas devigataj repagi ĝin.

La monŝuldo ankaŭ estas la nov-koloniismo aŭ la koloniismo ŝanĝiĝinta en "teknikajn bon-intencojn". Fakte, ni devus diri... "en teknikajn mon-atencojn". Kaj ili mem proponis al ni financado-fontojn kaj pruntedonantojn. Tiu ĉi vorto, kiun ni ĉiutage uzas, signifas ke la donanto generas la dronanton. Tiuj ĉi krimaj pruntedonantoj estis al ni rekomanditaj. Oni prezentis al ni dosierojn kaj allogajn kapital-muntaĵojn. Ni fariĝis ŝuldantoj dum daŭro je kvindek aŭ sesdek jaroj kaj eĉ pli. Tio signifas, ke oni instigas nin kompromiti niajn popolojn dum kvindek jaroj kaj pli.

Sub sia nuna formo, la monŝuldo elvokas lerte organizitan rekonkeron de Afriko, por ke ĝia kresko kaj disvolviĝo alkonformiĝu al gradoj kaj normoj tute fremdaj laŭ ni. Agante tiamaniere, ke ĉiu el ni fariĝos financa sklavo, t.e. sklavo de tiuj, kiuj havis la oportunaĵon, la ruzon, la perfidon investi en fondusoj ĉe ni kun nia devigo repagi. Oni diras al ni, ke ni repagu la monŝuldon. Tio ne estas afero pri moralo. Tio ne rilatas al tiu ĉi laŭdira digno repagi aŭ ne repagi.

Sinjoro Prezidanto,

Ni aŭskultis la Norvegan ĉefministron, kiam ŝi tie ĉi mem parolis. Ŝi diris, kiel Eŭropanino, ke ne ĉiu monŝuldo povos esti repagita. Mi nur dezirus kompletigi ŝiajn parolojn dirante, ke la monŝuldo ne estu repagita. La monŝuldo ne estu repagita, unue ĉar, se ni ne repagos ĝin, niaj pruntedonantoj ne mortos. Tute evidente ! Male, se ni repagos ĝin, ja mortos ni. Same evidente ! Kiuj instigis nin al nia ŝuldo, tiuj ludis kvazaŭ en monvetejo. Kiomlonge ili gajnis, tiomlonge ne okazis debato. Ĉar ili nun malgajnas, ili postulas de ni la repagon. Kaj ni parolas pri krizo. Ne, Sinjoro Prezidanto, ili perludis monon, ili malgajnis, tio estas la regulo de la ludo. Kaj la vivo plu daŭras (*aplaŭdoj*).

Ni ne povas repagi la ŝuldon, ĉar ni havas nenion por pagi. Ni ne povas repagi la ŝuldon, ĉar ni ne responsas pri la ŝuldo. Ni ne povas repagi la ŝuldon, ĉar male la aliaj ŝuldas al ni tion, kion la plej grandvaloraj riĉaĵoj neniam povos repagi al ni, t.e. la sangoŝuldon. Ja nia sango estis verŝita.

Oni parolas pri la Plano Marŝal, kiu rekonstruis la Eŭropan ekonomion. Sed oni ne parolas pri la Afrika Plano, kiu ebligis al Eŭropo alfronti la hitlerajn hordojn, kiam iliaj ekonomioj estis minacataj, kiam iliaj stabilecoj estis minacataj. Kiu savis Eŭropon ? Nu, Afriko ! Oni malmulte parolas pri tio. Oni tiom malmulte parolas pri tio, ke ni ja ne povas esti kompliko de tiu ĉi sendanka silento. Se la aliaj ne povas laŭdi nin, almenaŭ ni havas la devon diri, ke niaj patroj estis kuraĝaj kaj, ke niaj tiamaj batalantoj savis Eŭropon kaj fine ebligis, ke la mondo forpelos la naziismon.

La ŝuldo estas ankaŭ la rezulto de la kontraŭstaroj. Kiam hodiaŭ iu parolas al ni pri ekonomia krizo, tiu forgesas diri, ke la krizo ne spontanee aperis. Deeterne la krizo ekzistas kaj ĝi pli kaj pli akriĝos ĉiufoje, kiam la amasoj konscios pri siaj rajtoj fronte al la ekspluatistoj.

Okazas krizo, ĉar la amasoj rifuzas, ke la riĉaĵoj koncentriĝu en la manoj de kelketaj fiuloj. Okazas krizo, ĉar kelkaj fiuloj deponas en alilandaj bankoj gigantajn sumojn, kiuj estus sufiĉaj por la disvolviĝo de Afriko. Okazas krizo, ĉar fronte al tiuj ĉi apartaj riĉaĵoj, kies posedantoj estas konataj, la popolamasoj rifuzas vivi en la getoj kaj kvartalaĉoj. Okazas krizo, ĉar la popoloj ĉie rifuzas loĝi en Soŭeto vidalvide de Johanesburgo. Do estas lukto kaj la akriĝado de tia lukto instigas la estrojn de la financa povo al la maltrankvilo.

Nun oni postulas de ni, ke ni estu kunagantoj pri la serĉado de harmonio. Harmonio favore al la estroj de la financa povo. Harmonio malfavore al niaj popoloj. Ne ! Ni ne povas esti kunagantoj. Ne ! Ni ne povas kunlabori kun tiuj, kiuj elsuĉas la sangon de niaj popoloj kaj vivas per la ŝvitado de niaj popoloj. Ni ne povas kunlabori kun ili en iliaj murdaj entreprenoj.

Sinjoro Prezidanto,

Ni aŭdas pri kluboj – Klubo de Romo, Klubo de Parizo, Klubo de Ĉie ajn. Ni aŭdas pri la Grupo de la Kvin, de la Sep, pri la Grupo de la Dek, eble pri la Grupo de la Cent. Kaj mi ne scias pri kio ! Se ĉio ĉi estus logika, ni nepre fondus niajn klubon kaj grupon. Ni faru tiel, ke de nun Adis-Abebo fariĝos la sidejo, la centro, el kiu deiros la nova impeto de la Klubo de Adis-Abebo. Nia devo estas krei unuigitan fronton de Adis-Abebo kontraŭ la ŝuldo. Nur tiel ni povos diri, ke, rifuzante repagi, ni venas ne spite, sed male ni venas helpeme por vere paroli pri tiu realaĵo.

Aliflanke la Eŭropaj popolaj amasoj ne kontraŭas la Afrikajn popolojn. Kiuj deziras ekspluati Afrikon, tiuj ekspluatas ankaŭ Eŭropon. Ni havas la saman malamikon. Konsekvence, nia klubo el Adis-Abebo devos diri ankaŭ al ĉiuj, ke la ŝuldo ne povos esti repagita. Kiam ni diras, ke la ŝuldo ne povos esti repagita, tio ne signifas, ke ni kontraŭas la moralon, la dignon, la respekton de niaj promesoj. Ni opinias, ke ni ne havas similan moralon ol la aliaj. Inter la riĉulo kaj la malriĉulo ne ekzistas simila moralo. Biblio kaj Korano estas nekapablaj simile servi la ekspluatantojn kaj la ekspluatatojn. Se estus tiel, oni nepre eldonus du variantojn de Biblio kaj ankaŭ de Korano. *(aplaŭdoj)*

La moralon de niaj ekspluatantoj ni ne povas akcepti. Ni ne povas akcepti, ke ili admonas nin al digno. Ni ne povas akcepti, ke la pagantoj estas fidindaj, dum la nepagantoj estus nefidindaj. Ni devas male diri, ke tiuj plej ŝtelemaj estas ankaŭ tiuj plej riĉaj, kaj ke tiu ĉi fakto estas nun plenrajte akceptita. Ŝtelante, malriĉulo faras nur kulpetan ŝteleton. La fiskon, la doganojn la riĉuloj ŝtelas kaj ili mem ekspluatas la popolon.

Sinjoro Prezidanto,

Mia propono neniel celas provokon aŭ spektaklon. Mi dezirus diri tion, kion ĉiu inter ni opinias kaj deziras. Kiu ne deziras ĉi tie, ke la ŝuldo tute kaj plene forviŝiĝu ? Kiu ne deziras tion, tiu povas eliri, forflugi kaj tuj eniri en la tutmondan bankon por pagi. *(aplaŭdoj)* Mi ne deziras, ke oni rigardu la proponon de Burkino kvazaŭ fontinta el nematuraj kaj nespertaj junuloj. Mi ankaŭ ne deziras, ke oni opiniu, ke nur la revoluciuloj tiel parolu. Mi deziras, ke oni konsentu, ke nia propono estas simple objektiva kaj evidenta.

Inter tiuj, kiuj diris ke oni ne repagu la ŝuldon, mi povas citi same revoluciulojn, kiel ne-revoluciulojn, same junulojn, kiel maljunulojn. Mi ekzemple citos Fidel Castro-n. Li jam diris ke li ne pagos. Li ne estas samaĝa kiel mi, eĉ se li estas revolucia. Ankaŭ François Mitterand diris, ke la afrikaj landoj ne povas pagi, ke la malriĉaj landoj ne povas pagi. Mi citos Sinjorinon la ĉefministron de Norvegio. Mi ne scias ŝian aĝon kaj mi riproĉus min, se mi pridemandus ŝin pri tio. *(ridoj kaj aplaŭdoj)*

Mi dezirus ankaŭ citi la prezidanton Félix Houphouët-Boigny. Li ne estas samaĝa kiel mi. Tamen li oficiale kaj publike sciigis, ke almenaŭ koncerne lian landon la ŝuldo ne povos esti repagita. Ebur-Bordo estas tamen rangita en la plej bonhavaj landoj de Afriko, almenaŭ el la franclingvaj landoj. Tial, la fakto, ke ĝia kontribuo estas pli alta ĉi tie, estas krome normala. *(aplaŭdoj)*

Sinjoro Prezidanto,

Tiel parolante, mi estas neniel provokema. Mi dezirus, ke vi tre saĝe proponu al ni solvojn. Mi dezirus, ke nia konferenco adoptu tiun nepran devon, kiu klare diros, ke ni ne povos pagi la ŝuldon. Per interkonsento nek atakema nek agresema, almenaŭ por eviti, ke oni tuj murdos nin unu post la alia. Se Burkino sole rifuzos pagi la ŝuldon, mi ne ĉeestos okaze de la venonta konferenco¹. Male, per ĉies subtenado, kiun mi multe bezonas, *(aplaŭdoj)* per ĉies subtenado, ni ne nepre estos devigataj pagi la ŝuldon. Kaj se ni ne repagos la ŝuldon, ni povos dediĉi niajn malabundajn vivrimedojn al nia propra disvolviĝo.

Kaj mi dezirus fini trankviligante la landojn, kiuj suspektas nin malhonestaj : se ni ne repagos la

¹ Thomas Sankara estis murdita malpli ol tri monatojn poste.

ŝuldon, ĉio ŝparita ne utilos por paradaj elspezoj. Al ĉiuj ĉi ni ne plu aspiras. Ĉio ŝparita utilos por la disvolvigo de niaj landoj. Aparte ni evitos ŝuldon pro aĉeto de armilaro, ĉar Afrika lando aĉetinta armilojn, certe uzos ilin kontraŭ alia Afrika lando. Kiu Afrika lando tie ĉi povas sin armi por sin protekti kontraŭ la atombombo? Neniu lando kapablas fari tion. De la plej armita al la malplej armita. Sed ĉiujfoje kiam Afrika lando aĉetas armilon, tiu ĉi utilas kontraŭ Afrikano, ne kontraŭ Eŭropano, ne kontraŭ Azia lando. Konsekvence, kiam ni komencos trovi solvojn pri la problemo de la ŝuldo, ni devos ankaŭ trovi solvojn pri la problemo de la armado.

Mi estas militisto kaj mi portas armilon. Male, Sinjoro Prezidanto, mi dezirus, ke ni senarmiĝu. La ununura armilo, kiun mi posedas, estas tiu, kiun mi portas, dum aliaj kaŝas la armilojn, kiujn ili posedas. (*ridoj kaj aplaŭdoj*) Tial, karaj fratoj, per ĉies subteno, ni povos pacigi nian hejmon.

Por plifortigi Afrikon, ni povos ankaŭ uzi ĝiajn vastajn rimedojn, ĉar nia grundo kaj subgrundo enhavas multajn valoraĵojn. Ni posedas sufiĉajn riĉaĵojn kaj krome grandegan merkaton tra la tuta Afriko, de la nordo al la sudo, de la oriento al la okcidento. Ni havas sufiĉe da intelektaj kapabloj por krei aŭ preni la ĉieajn teknologiojn kaj sciencojn, kiujn ni povos trovi.

Sinjoro Prezidanto,

Ni agu tiamaniere por firmigi tiun fronton de Adis-Abebo kontraŭ la ŝuldo. Ni agu tiamaniere, por ke ni decidu limigon de la konkuro al la armado inter malfortaj kaj malriĉaj landoj pere de la fronto de Adis-Abebo. La kluboj kaj tranĉilegoj, kiujn ni aĉetas, estas neutilaj. Ni devas agi tiamaniere, ankaŭ por ke la Afrika merkato estu por la Afrikanoj, produktante, transformante kaj konsumante en Afriko. Ni produktu tion, kion ni bezonas kaj ni konsumu tion, kion ni produktas, anstataŭ importi tion ĉi.

Ĉi tien venis Burkino por prezenti al vi la ktonaĵojn produktitajn en Burkino, teksitajn en Burkino, kudritajn en Burkino por vesti la Burkinanojn. Mia delegacio kaj mi mem estas vestitaj de niaj teksistoj kaj kamparanoj. Mi ne organizas modo-paradon, sed mi dezirus simple diri, ke ni devas afrike vivi. Tio estas la ununura maniero por libere kaj digne vivi.

Mi dankas vin, Sinjoro Prezidanto.

La patrio aŭ la morto, ni venkos ! (*daŭraj aplaŭdoj*)

Thomas Sankara (1949-1987)

Tradukis Philippe Lachaux kaj Christian Rivière

Fonto : "*Oser inventer l'avenir*" : la parole de Sankara / "*Por aŭdaci la elpenson de la estonteco*" : la parolo de Sankara, prezentita de David Gakunzi, Pathfinder- kaj l'Harmattan-eldonoj, jaron 1999-an.

Thomas Sankara : mallonga biografio

Thomas Sankara naskiĝis la 21-an de decembro 1949-a en la Voltalando, tiama franca kolonio, kiu ricevis sian sendependecon en 1960. Dum sia infanaĝo, li ricevis rigoran edukadon, inkluzive de armeaj kaj religiaj valoroj. Lia patro estis batalanto dum la Dua Mondmilito sine de la Franciuj Liberaj Armeoj (franclingve : FFL). Dank' al la situacio de sia patro, kiu estis ĝendarmo-flegisto, li povis eskapi la mizeron, kiun travivis la plimulto el liaj samlandanoj. Post siaj studoj en la armea gimnazio de Vagaduguo, li rifuzis studi en la seminario kaj elektis militan trejniĝon kiel oficiro en la Inter-Armita Lernejo de Jaundo (Kameruno). Poste, li foriris al Madagaskaro, por studi en la Armea Akademio de Antsirabe, kie li lernis la politikan sciencon, la politikan ekonomion, la francan lingvon kaj la agronomion. En 1972 li ĉeestis la revolucion kontraŭ la novkoloniisma reĝimo de Philibert Tsiranana, la unua prezidanto de la Madagaskara Respubliko. Kiam li revenis en sian landon en 1973 kun la rango de subleŭtenanto, li estis nomumita al la trejnado de la junaj rekrutoj. En 1976 li fariĝis kapitano kaj komandis la Ŝtatan Centron por la trejnado de Atak-taĉmento. Dum tiu sama jaro, li fondis kune kun kelkaj kamaradoj oficiroj, el kiuj estis Blaise Kampaoré, sekretan organizaĵon : la Frakcion de la Komunistaj Oficiroj. Dum siaj armeaj studoj Thomas Sankara interesiĝis pri la teorioj de Markso kaj proksimiĝis al ekstrem-maldekstraj aktivuloj.

De la fino de la 70-aj ĝis la komenco de la 80-aj, la lando travivis alterne periodojn de aŭtoritateco kaj de demokrateco, sed la tradiciaj politikistoj truditaj de la antaŭa kolonia potenco, ne sukcesis ricevi la subtenon de la novaj urbaj mezklasoj pli junaj kaj progresismaj.

En 1980, post la unua ŝtatrenverso, Thomas Sankara partoprenis en la registaro de la kolonelo Saye Zerbo kiel ŝtatssekretario de la informo sed li devis demisii, post kiam li akuzis la regnestron ke tiu ĉi ne respektis la strikorajton.

La 7-an de novembro 1982-a, dank' al nova ŝtatrenverso ekregis Jean-Baptiste Ouédraogo, armea kuracisto. Thomas Sankara fariĝis lia ĉefministro. Tiam li malgloris la novkoloniisman politikon de Francujo kaj pli ĝenerale la imperiismon de la riĉaj okcidentaj nacioj, ĉu eŭropaj ĉu Usonaj, kontraŭ la malriĉaj nacioj de la Tria Mondo. Post kiam li ricevis la libian regnestron Muamar Kadafi, li estis eksigita kaj submetita al deviga restadejo la 17-an de majo 1983-a. Laŭ la franca registaro, ĉar li invitis Kadafi-on, Sankara faris diplomatan eraron. Sed amasprotestoj subtenataj de la sindikatoj kaj de la maldekstraj partioj, rapide devigis la registaron ke ĝi liberigu Sankara-on. La 3-an de aŭgusto, la ribelema garnizono de Pô (urbeto sude de Vagaduguo) kun ĝojega popolamaso kune eniris en la ĉefurbon kaj enoficigis Thomas Sankara-on kiel prezidanton de la Nacia Konsilio de la Revolucio (CNR laŭ la franca). Li tuj konsistigis registaron kun la Afrika Partio por Sendependeco (fr. PAI) kaj la Rekonstruita Unio de la Komunistaj Luktoj (fr. ULC-R).

Tuj kiam li estris la NRK-on, Thomas Sankara deklaris, ke liaj celoj estas : « rifuzi la staton de mizero ; malpezigi la financajn devojn ; liberigi la kamparojn de ĉia feŭda inercio ; demokratigi la socion ; klerigi la popolon pri la kolektiva responso por aŭdace elpensi la estontecon ; cedi kaj alikonstrui la administracion por alie bildigi la funkciulojn vide de la civitanoj ; ke la armeo enprofundiĝu en la amaspopolon per la produktiva laborado, kaj ke ĝi ĉiam memoru, ke sen patriotisma klereco, soldato estas nenio krom eventuala krimulo ».

La 4-an de aŭgusto 1984-a, unua datreveno de lia ekrego, la Respubliko de Voltalando estis alinomita "Burkina Faso", kio signifas "lando de la honestaj homoj" laŭ regionaj Afrikaj dialektoj.

Pri la demokrateco, Thomas Sankara doktrinis progresemajn ideojn por pli partoprenigi siajn samnacionojn en la vivo de la nacio. « Balotilo kaj balota aparato mem ne konsistigas objektivan demokratecon. Kiuj regule organizas elektojn, kaj klopodas por la popolo nur antaŭ ĉiu elekto, tiuj ne havas sistemon efektive demokratitan. Oni povas koncepti demokratecon, nur kondiĉe ke ĉiuj formoj de povo estu en la manoj de la popolo : ĉu la ekonomia, ĉu la milita, ĉu la politika, ĉu la sociala kaj

kultura ».

La nova reĝimo celis ekonomian sendependecon, sen ekstera helpo, kion Thomas Sankara tiel priskribis : « Tiuj mon-helpoj [...] instalas en niaj mensoj [...] la emon kondukti kvazaŭ almozpetantoj, kion ni ne plu volas ! Ni produktu pli ĉar estas normale ke kiu donas, tiu trudas siajn volojn ». Importado de fruktoj kaj de legomoj estis malpermesita por instigi la komercistojn ke ili sin provizu el Burkino.

La elspezoj de funkciado malpliigis por pliigi la investadon. Inter 5 ĝis 12% estis deprenitaj de la salajroj sed la loĝado estis oficiale senpaga dum unu jaro.

En 1986, Burkino atingis sian celon t.e. po du manĝoj kaj dek litroj da akvo tage por ĉiuj. UNO deklaris pri Sankara : « Li venkis la malsaton : en kvar jaroj, Burkino fariĝis memsufiĉa ».

Atentema pri la medio, li denunciis la homan responson pri la antaŭeniĝo de la dezerto. En aprilo 1985-a, la arbo-dehako estis limigita, la vepro-fajroj malpermesitaj. Akvo-bariloj estis konstruitaj. Thomas Sankara taksis nesufiĉa la helpon de Francujo, kvankam ties entreprenoj majoritate profitis de tiuj grandaj vorkoj.

Simbole, vira bazaro-tago estis oficialigita por atentigi pri la oportuno partigi la hejmajn taskojn. Sankara proponis « porvivan salajron », deprenitan de la salajro de la edzo alspeze al la edzino. Li ĉesigis la dotojn, la truditajn geedziĝojn, malpermesis la ekscizon.

Je la internacia nivelo, li kritikis la maljustecon de la tutmondiĝo, la financon sistemon kaj la pezon de la ŝuldo de la tria mondo. Burkino ne prunteprenis el la FMI, kies kondiĉojn li rifuzis. Tri monatojn antaŭ sia mortigo, li prononcis, dum kunveno de la Organizaĵo de la Afrika Unuiĝo en Adis-Abebo en 1987, diskurson plu faman pri la necesa kolektiva rifuzo de afrikaj landoj pagi sian ŝuldon.

Sankara ankaŭ provis limigi la povon de la tribestroj, kaj integri la virinojn en la socion egale kiel la virojn.

Francujo fariĝis la precipa kritikajo de la revolucia parolo. Tio akmeis okaze de la vizito de François Mitterrand en Burkino en novembro 1986-a, dum kiu Thomas Sankara violente kritikis la politikon de Francujo pro ties akcepto de Pieter Botha, la Ĉefministro de Sud-Afriko, kaj de Jonas Savimbi estro de l' UNITA, ambaŭ « kovritaj de sango de la piedoj ĝis la kapo ». Francujo limigis sian ekonomian helpon je 80 % inter 1983 kaj 1985, kaj komenciĝis kampanjo de malfamigo kontraŭ Thomas Sankara en Francujo.

Ekde septembro 1986-a Thomas Sankara sendis junajn Burkinanojn en Kubon por ke ili ricevu profesion instruadon kaj partoprenu, reveninte, en la disvolvado de sia lando, fariĝinte kuracistoj, inĝenieroj, agronomoj aŭ ginekologoj. Ili estu volontaj kaj elektitaj surbaze de konkurso kun prioritato por la orfoj, la kamparanoj kaj la malriĉuloj.

Denuncante la subtenon de Usono al Israelo kaj al Sudafriko, li alvokis la afrikajn landojn ke ili bojkotu la Olimpiajn Ludojn en Los Angeles. Antaŭ la Ĝenerala Asembleo de UNO, li denunciis ankaŭ la invadon de Grenado fare de Usono, kiu rebatis per ekonomiaj sankcioj. Same ĉe UNO, li postulis la abrogon de la veto-raĵto de la grandaj landoj. Li subtenis la naciajn postulojn de Okcidenta Saharo, Palestinon, la nikaragvajajn sandinistojn kaj la sud-afrikan ANC. Li flegis bonajn rilatojn kun la gvinean Jerry Rawlings kaj la libian Mouammar Kadhafi, sed restis relative izolita en Okcidenta Afriko. En oktobro 1986-a, ĵus antaŭ la renkonto Gorbachev-Reagan en Rejkjaviko, li iris unu semajnon en Sovet-Union, ankaŭ du fojojn en Kubon.

Antaŭ UNO, li defendis la rajton de la popoloj satmanĝi, ne soifi kaj esti instruataj.

Pluraj afrikaj reĝimoj proksimaj al Francujo organizis provon de malstabiligo de Burkino por

renversi Thomas Sankara-on. Moussa Traoré, prezidento de Malio, subtenata de Eburbordo kaj Togolando, cirkuligis rumorojn kaj deklaris kelksemajnan militon kontraŭ Burkino. »

La 15an de oktobro 1987-a, Thomas Sankara kaj ses membroj de lia kabineto kunvenis. Militistoj subite mortigis la gardistojn, eniris en la kunven-ĉambron kaj ordonis al la ĉeestantoj ke ili eliru. Thomas Sankara eliris kapvice, dirante al la aliaj « ne moviĝu, min ili bezonas » ; tiam li estis mortpafita. Same pri la aliaj, krom Alouna Traoré (la sola postvivanto).

Krom Thomas Sankara, dek du personoj estis murditaj. En la vespero, komunikaĵo anoncis la dissolvon de la nacia Konsilio de la Revolucio kaj la demision de la prezidento Sankara, anstataŭata de Blaise Compaoré. La postan nokton, Thomas Sankara kaj liaj kamaradoj estis enterigitaj sen tomboj. La morto-atesto de Sankara, publikigita en la ĵurnalaro, asertis ke lia morto estis natura.

Blaise Compaoré, la nova estro de Burkino, estis suspektata kiel precipa responsanto de lia murdo.

La 14an de majo 2015-a, post la renverso de Blaise Compaoré, Mariam Sankara unuafoje revenis en Vagaduguo por renkonti la juĝiston kiu enketis pri la morto de ŝia edzo. Ŝi estis akceptita de pluraj miloj da personoj. En majo 2015-a, korpo estis eligita de la enterigejo de Dagnoën por decidi ĉu temas pri Sankara kaj scii pli pri lia morto. En decembro 2015-a, Blaise Compaoré, ekzilita en Eburbordo estis persekutita pro sia supozata rolo en la murdo de Thomas Sankara en 1987.

La 28an de novembro 2017-a, Emmanuel Macron anoncis ke ĉiuj francaj dokumentoj ligitaj al lia murdo estos malklasifikitaj por la burkina justico, kio efektiviĝis en 2020.

En oktobro 2020-a, la militista tribunalo listigis dudek kvin kulpigitajn, i.a. Blaise Compaoré, Gilbert Diendère kaj Hyacinthe Kafando, pro la murdo de Sankara kaj de dek du aliaj personoj.

La 17an de aŭgusto 2021-a, la militista prokuroro de Burkino anoncis ke la proceso de Blaise Compaoré kaj de dek tri aliaj akuzitoj okazos la 11an de oktobro 2021-a. Tamen, Eburbordo rifuzis la ekstradicion de la eksa prezidento de Burkino.

Pluraj landoj estis suspektataj ke ili havis rolon en tiuj murdoj : kapvice Francujo (pro la aktiveco de Sankara kontraŭ la novkoloniismo, la imperialismo kaj la t.n. Francafriko), sed ankaŭ Eburbordo, kaj eĉ Libio (al kiu Sankara rifuzis sian militistan helpon en kelkaj okazoj).

Thomas Sankara estas foje rigardata kiel la « afrika Che Guevara », ofte kiel « modelo por la junularo ». En Burkino, li plu estas referenco por amaso da partioj kaj da movadoj. Oni foje kromnomas lin la « prezidento de la infanoj » aŭ la « prezidento de la malriĉuloj ».

La 28an de decembro 2005-a, avenuo de Vagaduguo ricevis lian nomon, kadre de procezo de rehonorigo dekretita en 2000 (sed sen rezulto de tiam). En 2007, unuan fojon de 19 jaroj, la vidvino de Thomas Sankara, Mariam Sermé Sankara, povis enpensiĝi antaŭ lia supozata tombo okaze de la dudeka datreveno de lia morto.

La 2an de oktobro 2016-a, memor-monumento dediĉita al Thomas Sankara estis inaŭgurita sur la loko de lia murdo.

Kompilis kaj tradukis Christian Rivière

Citaĵoj

« On peut tuer un homme mais pas des idées. » 1987

« *Eblas mortigi homon, ne ideojn.* » 1987

« Vous ne pouvez pas accomplir des changements fondamentaux sans une certaine dose de folie. Dans ce cas précis, cela vient de l'anticonformisme, du courage de tourner le dos aux vieilles formules, du courage d'inventer le futur. Il a fallu les fous d'hier pour que nous soyons capables d'agir avec une extrême clarté aujourd'hui. Je veux être un de ces fous. Nous devons inventer le futur. » 1985

« *Vi ne povas plenumi fundamentajn ŝanĝojn sen minimumo da frenezeco. Ĉikaze, tio venas de la malkonformismo, de la kuraĝo rezigni la malnovajn pensmanierojn, de la kuraĝo elpensi la estontecon. La hieraŭaj frenezuloj estis necesaj por ke ni estu kapablaj agi klare hodiaŭ. Mi volas esti unu el tiuj frenezuloj. Ni devas elpensi la estontecon.* » 1985

« L'inégalité ne peut être supprimée que par l'établissement d'une nouvelle société, où les hommes et les femmes jouiront de droits égaux... Ainsi, la condition de la femme ne s'améliorera qu'avec l'élimination du système qui l'exploite. » 1987.

« *La neegalecon eblas neniigi nur per starigo de nova socio, en kiu viroj kaj virinoj ĝuos la samajn rajtojn... Tiam, la kondiĉo de virino pliboniĝos nur per la forigo de la sistemo kiu ekspluatas ŝin.* » 1987.

« La famille patriarcale fit son apparition, fondée sur la propriété unique et personnelle du père, devenu chef de famille. Au sein de cette famille, la femme était opprimée. » 1987

« *La patreca familio iam aperis, fondita surbaze de la sola kaj ekskluziva proprieto de la patro, kiu tiel fariĝis familiestro. Sine de tia familio, la virino estis subpremata.* » 1987

« La révolution et la libération des femmes vont de pair. Nous ne parlons pas de l'émancipation des femmes comme d'un acte de charité ou à cause d'un élan de compassion humaine. C'est une nécessité fondamentale pour le triomphe de la révolution. Les femmes soutiennent l'autre moitié du ciel. »

« *La revolucio kaj la liberigo de la virinoj kunefikas. Ni ne parolu pri la emancipo de la virinoj kiel pri karitata ago pro elano de humana kompatato. Estas fundamenta neceso por la triumfo de la revolucio. La virinoj subtenas la alian duonon de la ĉielo.* »

« La vraie émancipation de la femme, c'est celle qui responsabilise la femme. »

« *La vera emancipo de virino, estas tiu kiu responsigas la virinon.* »

« Un militaire sans formation politique n'est qu'un criminel en puissance. »

« *Militisto sen politika eduko estas nenio krom eventuala krimulo.* »

« Il faut choisir entre le champagne pour quelques-uns et l'eau potable pour tous. »

« *Oni elektu inter ĉampano por kelkaj kaj trinkebla akvo por ĉiuj.* »

« Je préfère vivre un jour comme un lion, que de vivre cent ans comme un mouton. »

« *Mi preferas vivi unu tagon kiel leono, ol vivi cent jarojn kiel ŝafo.* »

« Il faut que l'école nouvelle et l'enseignement nouveau concourent à la naissance de patriotes et non d'apatrides. »

« *La nova lernejo kaj la nova instruado kunefiku en la genero de patriotoj, ne de senpatriuloj.* »

« Ni le coran ni la bible n'ont jamais réconcilié le riche et le pauvre. »

« *Nek la korano nek la biblio iam reamikigis la riĉulon kaj la malriĉulon.* »

